

August Heinrich Hoffmann,  
Vespera kanto

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Surkampare iĝas  
ree nun vesper',  
milde subeniĝas  
paco de l' eter'.

Nur de l' roko bruas  
rivereta flu',  
kaj la akvo fluas  
ĉiam ĉiam plu.

Ne haltigas iu  
ĝin je l' tagofin',  
kaj vesper' neniu  
ripozigas ĝin.

Mia kor', senlace  
strebas ankaŭ vi,  
vi ripozos pace,  
nur se volos Di'.

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de AUGUST HEINRICH HOFFMANN (Hoffmann von Fallersleben, \*1798-04-02 - †1874-01-19) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1988-04-16.*

MR-212.1 / Arg-645-1302 (2012-11-04 23:01:54)

*Pri la aŭtoro vidu la vikipedian retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/August\\_Heinrich\\_Hoffmann\\_von\\_Fallersleben](http://eo.wikipedia.org/wiki/August_Heinrich_Hoffmann_von_Fallersleben). La melodion verkitan de Christian R. Rinck oni povas aŭdi en <http://www.musicanet.org/robokopp/Lieder/abendwir.html>. Pri la komponisto rigardu: [http://de.wikisource.org/wiki/ADB:Rinck,\\_Johann\\_Christian\\_Heinrich](http://de.wikisource.org/wiki/ADB:Rinck,_Johann_Christian_Heinrich).*

August Heinrich Hoffmann,  
Abendlied

Abend wird es wieder,  
über Wald und Feld  
säuselt Frieden nieder,  
und es ruht die Welt.

Nur der Bach ergießet  
sich am Felsen dort,  
und er braust und fließet  
immer, immer fort.

Und kein Abend bringet  
Frieden ihm und Ruh',  
keine Glocke klinget  
ihm ein Rastlied zu.

So in deinem Streben  
bist, mein Herz, auch du.  
Gott nur kann dir geben  
wahre Abendruh!

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas AUGUST HEINRICH HOFFMANN (Hoffmann von Fallersleben, \*1798-04-02 - †1874-01-19).*

Arg-645-1300 (2012-11-27 18:18:40)

*Siehe auch: [http://de.wikipedia.org/wiki/August\\_Heinrich\\_Hoffmann\\_von\\_Fallersleben](http://de.wikipedia.org/wiki/August_Heinrich_Hoffmann_von_Fallersleben). Vidu ankaŭ: [http://eo.wikipedia.org/wiki/August\\_Heinrich\\_Hoffmann\\_von\\_Fallersleben](http://eo.wikipedia.org/wiki/August_Heinrich_Hoffmann_von_Fallersleben) kaj <http://www.musicanet.org/robokopp/fallers.html>. Siehe auch: <http://www.swr.de/swr2/program/sendungen/wiegenlieder/rueckschau/-/id=556006/nid=5556006/did=6102144/pv=mplayer/vv=popup/1vijptk/index.html>.*